

tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Ĉasopis Hrvatskog saveza za esperanto

oktobro 2007

n-ro **96**



- ★ Post UK en Jokohamo: la plej granda japana poeto TANIKAWA Shuntarō gastas en *Tempo*
- ★ Kongresaj raportoj el Francio, Japanio, Slovenio kaj Bulgario
- ★ Rijeka: Centjara festo de Esperanto - la 17-an de novembro
- ★ Zagrebo: Kvindekjara festo de Studenta Esperanto-Klubo - la 10-an de decembro
- ★ Esperanto kadre de Interlingvistiko en Filozofia fakultato en Zagrebo

Karaj legantoj!

Antaŭ vi ŝtaras la aŭtuna numero de *Tempo*. Ĝi resumas nian Esperantan someron, kiu riĉis je diversaj kongresoj. Por multaj esperantistoj somero signifas - kongrespartoprenon. Iusence kongrespartopreni signifas aparteni.

La plej gravaj kongresoj okazis lastsomere en Azio: **Vjetnamio** gastigis Internacian Junularan Kongreson, kie kroatoj mankis, sed kie ne mankas la kroata kunlaboro: tie pretiĝis la vjetnama traduko de la kroata libro "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić" de Ivana Brlić-Mažuranić. Nafta industrio **INA** kaj **Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio** finance helpas por ke la konata infanverko aperu vjetname. Eble tio estos la unua traduko de la kroata literaturo en la vjetnaman. Ni ne povis konfirmi tiun supozon.

La japana havenurbo **Jokohamo** gastigis la 92-an Universalan Kongreson de Esperanto. La titolpaĝo montras al vi la imponan jokohaman vizaĝon kiel vidis ĝin la okuloj de **Kaja Farszky**, la plej juna partoprenanto el dek du kongresanoj el Kroatio. La artikolo *Karaj legantoj* ornamas la foto pri Kaja Farszky mem, dum la inaŭgura kongresero *Movada Foiro*, kie Kaja deĵoris ĉe la kroata tablo, apud la afiŝo pri la centa jubileo de Esperanto, informante pri Kroatio.



En la kongresa inaŭguro Kroation reprezentis s-ino Natalija Brmbota, aferŝarĝito en Ambassadejo de Kroatio en Japanio kiu ricevis multajn informojn pri Esperanto.

La kongresa kuriero **Ondas Jokohamo** notis 1823 partoprenintojn en la jokohama UK. El ili pluraj japanoj partoprenis nur honore, paginte la kotizon, kio estas la tradicio de japanoj subteni kongreson. La nombro de japanaj helpantoj superis la ciferon 200.

Inter multaj kontribuintoj eble la plej digna partopreninto de la jokohama UK gastas ĉi-foje en *Tempo*: temas pri unu el la plej gravaj japanaj poetoj **TANIKAWA Shuntarō** (1931). Li partoprenis en la kongresa programo **Renkonto kun poetoj japana kaj esperantaj**, por omaĝi al la japana eldono de poemaro de **William Auld**, japanigita de **USUI Hiroyuki**. Li mem voĉlegis la japanigitajn versojn de Julio Baghy, Mao Zifu, William Auld kaj István Ertl kaj aŭskultis siajn versojn en Esperanta traduko de **IZUMI Yukio**. La granda poeto donis permeson ke *Tempo* aperigu lian poemon en la originala japana, en la Esperanta kaj la kroata vestoj. Li subskribis sian nomon por la legantoj de *Tempo*. **Domagoj Vidović** kroatigis la poemon **Vortoj tuj antaŭ forpaso de l' avo**. Ĉu tio estas la unua traduko en la kroata de la fama japana poeto? Tion ni ne scias.

Ĝuu ĝin. Malofte grandaj naciaj poetoj gastas en Universalaj Kongresoj kaj en Esperantaj gazetoj.

En Jokohamo ekagis la nova estraro de UEA kun **Probal Daŝgupto** kiel prezidanto kaj **Barbara Pietrzak** el Pollando kiel sekretario. Kun la nova azia UEA-prezidanto Prof. D-ro Probal Daŝgupto Kroata Esperanto-Ligo tuj ekagis proponinte al Eŭropa Unio komunan kvarlandan libran projekton de Kroatio, Barato, Slovenio kaj Hinda Unio. Vi aŭdos pli pri ĝi venontjare, se EU akceptos ĝin por unu de siaj projektoj por la jaro 2008 - Internacia Jaro de Lingvoj.

Vi legos ke Ministerio pri scienco, edukado kaj sporto ebligis partoprenon de **Marija Jerković** en la **Konferenco de ILEI** en Ranzan en Japanio.

Kadre de la enkonduka artikolo vi vidas la simbolon de organizaĵo **Nacionalna zaklada za razvoj civilnog društva** (Nacia fondaĵo por evoluo de civila socio) kiu kun Ministerio de kulturo de Respubliko Kroatio kunfinancis la partoprenon de **Spomenka Štimec** en la kongresoj en Japanio.

En la kongreso en Japanio iel partoprenis ankaŭ tiuj esperantistoj kiuj ne ĉeestis persone. La gaja vizaĝo de Danka Tišljar (la tria de maldekstre) helpis varbi por junularaj programoj al kiuj grave, per la koncerto sur nekutima instrumento marimbo, kontribuis Kaja Farszky. Japana esperantisto **NISIO Tutomu**, granda amiko de Zagrebo, ne povinte mem partopreni en UK, trovis manieron por sendi monkontribuon: li kun Ministerio de kulturo de Respubliko Kroatio kunfinancas tiun ĉi numeron de *Tempo!* Dankon al ambaŭ!

Okaze de la centa jubileo de Universala Esperanto-Asocio ni kongresos en **Roterdamo en 2008**, dum la **Internacia Jaro de Lingvoj**. **Bjalistoko** estis elektita por la kongresa urbo de la jaro 2009 por omaĝi al la 150-a jubileo de la naskiĝo de Lazaro Ludoviko Zamenhof.

Sur la venontaj paĝoj vi trovos artikolojn pri la kongresaj kaj similaj eventoj: la Pariza IFEF (Zlatko Hinšt), la jokohama (Kaja Farszky), la instruista en Ranzan (Spomenka Štimec), la Eŭropa en Maribor (Zlatko Tišljar), La Infana sur Pohorje (Tena Kuzmanović), la Montkabana sur la insulo Cres (Vanja Radovanović).

En aŭgusto zagreba teatra festivalo **Pup teatra Internacia-Festivalo** - PIF atingis sian kvardekan jaron. La festivalo kiun lancis SEK-anoj en la jaro 1968 intertempe elkreskis al la plej malnova kaj prestiĝa zagreba festivalo. Indis labori pri ĝi. Tion kion esperantistoj ekplantis ne nur pluvivas sed digne fruktis.

Vi legos ĉi-numere ankaŭ pri nekongresaj temoj, ĉar niaj membroj aktivigas multkampe: **Lucija Borčić** donacis al KEL belan skulptaĵon prezentanta L.L. Zamenhof, kiu montrigis junaĝa verko de pentristo **Stevan Vukmanović**, famiĝinta en Germanio.

Membro de KEL **Željko Gubijan** gajnis ĉefpremion por la tri fotoj el serio *Anatomio de la tubero* ĉe grava ekspozicio de fotoj *Arbaro vidita per la okuloj de arbaristo* en Bjelovar. Membro de **Bude Borjan Renata Žunec** gastis sur titolpaĝo de *Jutarnji list* pro sia profesio, kiel membro de medicina teamo pri transplantado de organoj. Alia membro **Zlata Nanić** okazigis en sia bieno **Zrno - Grajno** dum la ĉiujara septembra festo de rikolto belan publikan prezenton de Esperanto.

Radenko Milošević, kiel prezidanto de Komitato pri la centa jubileo de Esperanto en Zagrebo kontaktis la Prezidenton de Respubliko Kroatio **Stjepan Mesić**, petante aŭspicion por la 100-jara jubilea evento en la jaro 2008. La propono ricevis buŝan aprobon. Ni atendas la



skriban konfirmon el la Oficejo de la Prezidento kaj esperas povi saluti la Prezidenton inter ni dum la festo.

La tria kunsido de Preparkomitato pri la jubilea Centjariĝo okazinta la 18-an de oktobro 2007 por la jubilea jaro antaŭvidas: **Libroekspozicio en Volksbank Kroatio** en februaro, **scenmuzikan feston en Vatroslav Lisinski** la 26-an de majo 2008 (se aprobotaj rimedoj), **Sciencan simpozion en Filozofia fakultato** en novembro kaj la ĉefan decembran Solenajon en Gradska vječna. Detaloj venontnumere.

D-ro Velimir Piškorec, docento pri la germana lingvo en Filozofia fakultato de Zagrebo, kunlabore kun KEL, eklaboris aktivigante prelegantojn por scienca simpozio okazonta en novembro 2008 en Filozofia Fakultato kun la temo **Esperanto kaj la kroata kultura identeco**. Pli multajn detalojn pri la programo ni povos komuniki venontnumere.

D-ro Velimir Piškorec lekcias en la Fako pri la germana lingvo kaj literaturo en Filozofia fakultato. Ekde oktobro dum du semestroj li instruos pri **elektitaj fragmentoj el Eko-kaj Interlingvistiko. En la fokuson de la studoj de studentoj pri la germana lingvo tiel eniros ankaŭ Esperanto. Tio estas nepre senprecedenca okazaĵo en Filozofia fakultato de Zagrebo!**

Enkonduke ne eblas sen malĝoja novaĵo. La 15-an de septembro 2007 finiĝis la vivo de prestiĝa zagreba esperantistino **Zlata Flego**. (La decembro numero 2007 enhavos adiaŭojn al niaj forpasintaj membroj.)

La aliaj plu portas la torĉon!

KUNE, Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj kandidatis Kroation por gastiganto de la venontjara Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. Ĉu blindaj esperantistoj havos sian mondkongreson en 2008 en Kroatio? Ni atendas la decidon de la estraro...

Kaj plej grave: **Esperanto en Kroatio atingis sian centan jubileon!** Neniu esperantisto el Kroatio rajtus manki en **Rijeka la 17-an de novembro 2007**. Ni ekviglu por la granda tago antaŭ ni. Tiam Esperanto Societo el Rijeka festas 100 jarojn ekde kiam estis fondita la unua Esperanta societo en Rijeka kaj la unua sur teritorio de Kroatio. Ĉu Rijeka ricevos por la jubilea festo sian Esperanto-straton? Ĉu la domo, kie estis la sidejo de la unua Esperanta societo en Kroatio ricevos memortabulon? Partoprenu por sperti tiun unikajon! Unu fojon en la vivo oni estas 100-jara!

En decembro sekvos plia festo: anstataŭ kutima Zamenhof-Tago Studenta Esperanta Klubo havos sian feston: **50 jarojn de Studenta Esperanto-Klubo!** La festo okazos en Europski dom la 10-an de decembro 2007.

Tempo gratulas al la urbo Rijeka kaj al ĉiuj kroataj esperantistoj, kaj tute aparte al esperantistoj el Rijeka nian centan jubileon!

Karaj legantoj, bonvolu dorsflanke de la revuo vidi la programon de la centa jubileo de Esperanto en Kroatio, festota en Rijeka.

S. Štimec

Dek du kroataj esperantistoj partoprenis la japanajn kongresajn aranĝojn en Jokohamo kaj Ranzan. Kiom da partoprenintoj, tiom da interpretoj. *Tempo* donis ĉi-foje la avantaĝon al la plej juna kroata partopreninto, *Kaja Farzsky*.

MI MUZIKIS EN JOKOHAMO



Ĉi-somere mi partoprenis la 92-an Universalan Kongreson en Jokohamo, de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto. Tio estis mia unua vojaĝo ekster Eŭropo. Ebligis ĝin la subvencio de 10.000 kunaŝoj, kiun en publika konkurso de kroata nafta kompanio INA ricevis Esperanto-Societo "Bude Borjan" por mia kontribuo al la UK en Jokohamo. (Mi membras en Studenta Esperanto-Klubo sed ankaŭ en "Bude Borjan", kie mi estas la plej juna membro.)

Mi havis plezuron kaj eblecon prezenti la marimban koncerton en la kongresa programo. La subvencio alvenis lastmomente kaj ege helpis min sinjorino Krizantemo, Kikushima Kazuko por ke mia koncerto eniru la kongresan oficialan programon. Mardon, la 7-an de aŭgusto 2007 estis granda tago por mi. Mi havis du koncertojn en Jokohamo. (La luado de granda instrumento marimbros kaj ties transporto

kostegis kaj necesis bone ekspluati ĝin en la sama tago.)

Imagu: estis somermeza aŭgusta vetero en la varmega Japanio je la dua posttagmeze. Kelkcentkapa publiko, homoj el multaj flankoj de la mondo estis en la Kongresejo en la salono Pacifiko-Jokohamo. En salono Hodler ĉiuj atendis koncerton, ili atendis mian muzikon. Mi por la unua fojo muzikis tiel for de mia lando, tiel for de ĉio konata. Sed mi tute ne sentis min kiel fremdulo. Mi havis mian instrumenton – marimbon – kiun mi tiel ŝatas, mi havis mian muzikon kun kiu mi vivas ĉiutage. La muziko estas belega lingvo, ĉiuj facile povas kompreni ĝin. Mi sentis kaj vidis, ke multaj homoj venis kaj interesiĝis pri la instrumento kiu ne estas sufiĉe konata. La publiko havis scivolemon pri la instrumento kaj pri la muziko kiun ili aŭdos. Mi komencis koncerton per la *Eta preĝo*, horalo komponita



por marimbo, ĝin verkis Evelyn Glennie. Sekvis komponaĵo *Michi* de japana aŭtorino Keiko Abe, du komponaĵoj de E. Séjourné kaj laste *Ses miniaturoj* de M. Schmitt. Mi mem anoncis la komponaĵojn. Unu horo kun la muziko rapide pasas. Mi vivis nur por la muziko en tiuj momentoj. Mi sentis, ke homoj spiris kun la muziko, ĝuis la belan sonon de marimbo kaj ĝojis kune kun mi, kiu ludis. Tio estas la plej bona premio por mi: la publiko kiu ŝatas mian muzikon, la publiko kiu komprenas la lingvon kiun mi parolas al ili.

Pli malfrue en la sama tago okazis la dua koncerto en la Kannai-halo, kiel parto de junulara programo de la kongreso de kiu ĉeforganizanto estis Mayuko Tazima kun Yayoi, Issei, Joshijasu kaj multaj aliaj helpantoj. En la koncerto ludis grupo *Asorti* el Litovio, mi je marimbo el Kroatio kaj du grupoj el Japanio kiuj ludis tradician japanan muzikon: *Miruku* kaj *Ŭorju*. En la fino de la koncerto ni ĉiuj kune kantis Esperantigitan, japanan kanton, *Vizaĝon supren*. En tiuj momentoj ni ĉiuj kune vivis en la muziko, ni spiris la saman aeron, ni parolis la saman lingvon. Kiel vere internacia grupo en la internacia renkontiĝo ni havis eĉ du internaciajn lingvojn: Esperanton kaj muzikon. Tio estis mia sperto pri Japanio: mi spertis Japanion tra la muziko de marimbo.

Kaja Farzsky



La unua jaro sen William Auld

La 11-an de septembro 2006 mortis la plejgranda Esperantlingva poetokaj kandidato por Nobel premio pri Esperantlingva literaturo William Auld. Okaze de la datreveno de la mortotago, ni memoras kio plaĉis al Auld el la kroata literaturo. Por ilustru literaturajn kapacitojn de Esperanto en *Nova Esperanta Krestomatio*, por montri tradukspecimenon el la kroata poezio, li elektis tre specifan paron: la poeton *Dobriša Cesarić*, la tradukiston *Božidar Vančik* kaj la simbiozan frukton de tiu lirika renkontiĝo en la poemo *Preaŭtuna tago*. Ni relegu la versojn kiuj plaĉis al Auld.

Japana poeto TANIKAWA Shuntarō gastas en *Tempo*

Unu el la plej grandaj japanaj poetoj TANIKAWA Shuntarō partoprenis en poezia programo de la japana UK en Jokohamo, kun USUI Hiroyuki, IZUMI Yukio, KITAGAWA Hisasi, István Ertl kaj Spomenka Štimec. Post la horo da japanaj kaj Esperantaj versoj, sekvis vigla podia diskuto pri poezio. La programo allogis kvindek da civitanoj de Jokohamo kaj estis eble la plej prestiĝa aranĝo por neesperantistoj en la lastaj jaroj de niaj Universalaj Kongresoj.

Ni legas en la akompana kajero pri la poeto:

"TANIKAWA Shuntarō. Naskiĝis en 1931. Unu el la plej gravaj poetoj japanaj. Verkis grandan nombron da poemaroj, bildstrioj, eseoj, fabeloj kaj tradukaĵoj depost la debuto en 1952 per la poemaro *Nizyūoku kōnen no kodoku* (Du miliardoj da lumjaroj de soleco). Ĉefaj poemaroj: *Hibi no tizu* (Mapoj ĉiutagaj), *Kotobaasobiuta* (Kantoj vortludaj), *Teigi* (Difinoj), *Sekensirazu* (Nekonantoj de l' mondo) k.a."

La granda poeto TANIKAWA Shuntarō donis la permeson por ke liaj versoj aperu en la japana originalo, en la Esperanta traduko de Izumi Jukio kaj en la kroata traduko de Domagoj Vidović. Li permesis publikigi en *Tempo* lian subskriban.



PREAŬTUNA TAGO

*Jam sen iama ard' la tago,
Sed sunas kaj ridetas ĝi.
Sen krio pasis kaj sen ago.
Lasta vendist' de dolĉglaci'.*

*Zigzagas tra la urb' senĝoje
La blanka homo de l' somer'.
Folio flava sinkas foje
Ĉe lia puŝoĉar' al ter'.*

*L' aŭtun' ja sojlas, kun nebuloj
Baldaŭaj kaj kun pluv' kaj morn'.
Kaj maronistoj - angululoj -
La polvon viŝas de la forn'.*

Dobriša Cesarić
Tradukis: Božidar Vančik

LA FOTOJ DE ŽELJKO GUBIJAN PREMIITAJ

Arbaro vidita per la okuloj de arbaristo estas la titolo de foto-eskpozicio *Kvara Salono de fotoĵoj en Bjelovar* okazinta en Bjelovar de la 15-a de junio ĝis la 15-a de julio 2007. La ĉefpremio iris al esperantisto Željko Gubijan el Vrbovec por tri fotoj el la serio tiolita *La anatomio de la tubero*. En la julia numero de *Tempo* ni informis vin, ke Željko Gubijan, cetere laŭ profesio arbaristo, fotis la titolpaĝon por la libro *Mediterranea breviero* de Predrag Matvejević. Sammonate li gajnis la premion kaj ricevis laŭdojn por la serio pri la gliro kaj por la fotoj *La granda komenco* kaj *Ventumilo*. La katalogo de la ekspozicio estis eldonita en kunlabore de *Gradski muzej Bjelovar, Galerija Nastje Rojc kaj Hrvatske šume*.



谷川俊太郎
こころのこころ

わたしは かじりかけのりんごをのこして
しんでゆく
いいのことは なにもない
よいことは つづくだらうし
わるいことは なくならぬだらうから
わたしには くちずさむうたがあったから
さびかかった かなづちもあつたから
いうことなしだ
わたしの いちばんすきなひとに
つたえておくれ
わたしは むかしあなたをすきになつて
いまも すきだと
あの上で つむぐことのできる
いちばんきれいな はなを
あなたに ささげると

しぬまえにおじいさんのいったこと

谷川 俊太郎

Vortoj tuj antaŭ la forpaso de l' avo

Lasante pomon ekmorditan
Mi mortas.
Ne necesas testamento.
Ĉar plu daŭros bonaj aferoj
Kaj ne seniĝos malbonaj,
Ĉar mi konas kanton zumindan,
Ĉar mi havis rustetan martelon,
Ne necesas testamento.
Nur
Mesaĝu al mia plej bona amatino:
Mi iam Vin ekamis,
Vin amas;
Mi dediĉos al Vi
La plej belan floron
Plukotan en la transa mondo.

Esperantigis: IZUMI Yukio

Riječi netom prije djedove smrti

Ostavljajući zagrizenu jabuku
Umirem.
Testament nije potreban.
Jer će i iza mene živjeti Dobro,
A Zlo se neće dokinuti,
Jer ja poznam pjesmu zviždanja vrijednu,
Jer sam držao zahrđali čekić,
Testament nije potreban.
Samo
Javite mojoj najdražoj ljubljenoj:
Nekoć sam te zavolio,
Tebe volim;
Posvetit ću ti
Najljepši od cvjetova
Koji ću ubrati na Onome svijetu.

Kroatigis: Domagoj Vidović

ESCEPTA EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO EN MARIBOR

28-a de julio - 4-a de aŭgusto 2007

La kongreso sendube estis el pluraj vidpunktoj escepta. La unuan fojon en iu Esperanto-kongreso partoprenis kaj en Esperanto parolis eĉ du membroj de Eŭropa Parlamento (Pola parlamentanino Margareta Handzlik kaj slovena Ljudmila Novak). La unuan fojon parton de la kongreso, ĝian konferencon pri interkultura dialogo kaj komunikado kunfinancis Eŭropa Komisiono per eĉ 25.000 eŭroj, la unuan fojon la ĉeftemo de eŭropa E-kongreso estis nerilata al lingvaj demandoj sed al la ekologia temo *Akvoj*.

La du eŭropaj parlamentaninoj efektive unuafoje en Maribor parolis inter si kaj tuj interkonsentis pri la iniciato de Ljudmila Novak organizi laŭeble baldaŭ en la ejoj de Eŭropa Parlamento en Bruselo ekspozicion pri Esperanto. Tion mi vidas kiel la ĉefan atingon de la kongreso. (Post la kongreso la prezidanto de EEU jam kunvenis kun parlamentanino Ljudmila Novak por interkonsenti pri ekspozicio en la ejoj de EU, kie li prelegos pri lingvaj temoj.) La kongreso krome akceptis konkludan dokumenton kiun ĝi adresis al slovena registaro kiu komence de 2008 gvidos Eŭropan Union. La 5 punktojn de la konkludoj sinjoro Marko Pavliha, parlamentano de Slovena Parlamento, transformis al oficiala peto kiun li adresis al la registaro, postulante de EU establi novan fondajon por edukado por eŭropa konscio kaj asertis ke necesas demandon pri Esperanto plutrakti kadre de eŭropaj instancoj. Komisionano de

EU pri scienco, Janez Potočnik, afable konfirmis la ricevon de postkongrese ricevataj kongresaj konkludoj kaj petis ke la samajn dokumentojn oni sendu al la komisionano pri lingvoj Leonard Orban.

La kongreso abundis je amuzaj, kulturaj kaj ekskursaj programeroj. Eĉ tri teatraj spektakloj ĝojigis la kongresanojn (unu el ili estis la zagreba spektaklo prezentita de Vanja Radovanović *La galaksia krosŝipo "Ludoviko"* en epizodo: *La muro de mallumo*. Tiel SEK havis la okazon antaŭ sia 50-jariĝo gastigi en belaj teatraj ejoj de *Slovensko narodno gledališče*. Partoprenis ankaŭ Saša Pilipović el Kragujevac kun *Galileo* kaj Henry de Sabates el Francio kun *Stilaj ekzercoj*.



Publiko en la prestiĝa maribora teatro antaŭ la SEK-prezentaĵo.
(Fotis: Zlatko Tišljar)

Vjekoslav Morankić kaj Radenko Milošević aktive partoprenis en la diskutoj pri la konferenca temo *Interkultura dialogo kaj komunikado*. En la konferenco prelegis ankaŭ la sekretario de EEU, kroato kaj sloveno Zlatko Tišljar apud 9 aliaj prelegantoj.

Judita Rey Hudeček gvidis *Infanan kongreseton* en kiu partoprenis ankaŭ 3 infanoj el Kroatio, financitaj de Elementa lernejo Retkovec.

Ĉefhelpantoj pri la kongresa dokumentaro kaj filmistoj de la materialo el kiu oni poste produktos filmon estis Danka kaj Krunoslav Tišljar el Zagrebo kaj helpanto pri la organizo de la konferenco estis Maja Tišljar. Kiel videblas, kroatoj havis elstaran rolon, malgraŭ tio ke Kroatio ne ankoraŭ estas regula sed nur observanta membro de EEU.

Fine mi menciu kelkaj kuriozaĵojn: La malfermon de la kongreso signis grandega torto kun E-flago per kiu oni festis 120-jaran jubileon de Esperanto. Mariboraj organizantoj, kiujn gvidis Zlatko Tišljar kaj Vesna Obradović (prezidanto kaj sekretario de LKK) prizorgis ankaŭ du verdajn surprizojn: verdan glaciaĵon Esperanto kaj verdan Esperanto-bieron.

Gazetaro abunde informis pri la Kongreso. Domaĝe ke ne pli da kroatoj klerigis dum abundaj kongresaj programoj, geografie tiom proksimaj al Kroatio!

Zlatko Tišljar



Dag Treer rolante en Maribor.
(Fotis: Z. Tišljar)

EKO - KAJ INTERLINGVISTIKO EN FILOZOFIA FAKULTATO DE ZAGREBO


D-ro Velimir Piškorec, docento pri la germana lingvo en Filozofia fakultato de Zagrebo, lekcios dum la venontaj du semestroj al dekkvino da siaj studentoj pri aparta temo titolita **Eko - kaj Interlingvistiko**. Interlingvistikon ne eblas studi sen koni esperantologion. La elektita temo ebligas al la studentoj ekkoni bazajn principojn de Esperanto prezentota per la germanlingva lernolibro *Lehrbuch der internationalen Sprache Esperanto* laŭ la Zagreba Metodo kaj eldonita en Maribor en Slovenio en 1995 en germanlingva prizorgo de Josef Wesian kaj D-ro Vesna Staničić-Burchards. Por la celo de la seminarianoj jam atingis la germanlingvan bibliotekon de la katedro pri la germana lingva la granda Krause - vortaro de Erich - Dieter Krause kun pli ol 160.000 kapvortoj, eldonita de la hamburga eldonejo Helmut Buske. Dum la studo la studentoj nepre analizos ankaŭ etimologion de Esperantaj vortoj.



EŬROPA INFANA KONGRESETO



Aŭtorino de la artikolo Tena Kuzmanović sur Pohorje.



MALKOVRITA RARA SKULPTAĴO PRI ZAMENHOF DE PENTRISTO STEVAN VUKMANOVIĆ



(Fotis: Kaja Farszky)

Lucija Borčić donacis al KEL skulptaĵon prezentanta Lazaron Ludovikon Zamenhof en staranta pozo. La alteco de la gipsa verko estas 35 cm. Ŝi rakontis, ke la skulptaĵon donacis al ŝi en fruaj kvindekaj jaroj iu kursano en la Esperanto-kurso, kiun ŝi gvidis. Lia nomo estas Stevan Vukmanović. Li forlasis Zagrebon meze de la kvindekaj jaroj kaj foriris al Munkeno, kie li fariĝis pentristo kaj en la postaj jaroj li gajnis prestiĝon en la germana pentroarto. Davor Klobučar esploris pri la artisto Vukmanović. Montriĝas, ke Stevan Vukmanović naskiĝis en Belgrado en 1924 kaj mortis en Germanio en 1995. Evidente en fruaj kvindekaj jaroj li loĝis en Zagrebo kaj okupiĝis pri skulptado. Li vizitis Esperantan kurson ĉe Lucija Borčić. Pri lia pentrista renomo atestas monografia libro titolita *Der Utrillo von Schwabing*, aludante, ke li prideseĝnis la germanan urbon Schwabing, kie li aktivis kaj ke li havis rangon de pentristo Utrillo. La aŭtoro de la verko pri Stevan Vukmanović estas Christian Schmidt kaj Herma Bashir-Hecht. En Germanio Vukmanović havis multajn ekspoziciojn kaj estas reprezentita en Munkeno ĉe la granda artekspozicio en *Haus der Kunst*, en fako Secesio.

La Zamenhof-skulptaĵo donacita de Lucija Borčić havis etan difekiĝon: iom rompitan pecon de la korpo de la kolo de Zamenhof. Ni tuj portis ĝin al riparejo al Pentroarta akademio de Zagrebo (hazarde en Zamenhof-Strato), kie lerte kaj ame riparitis ĝin diplominto pri restaŭra arto kaj membro de *Bude Borjan* Ivana Sambolić. La skulptaĵo ornamas le ejon de KEL. S. Ŝtimec serĉas kontaktojn kun la aŭtoroj de la libro pri Vukmanović, por informi ilin, ke en Zagrebo estis trovita la junaĝa verko de Stevan Vukmanović, el la epoko kiam li okupiĝis pri skulptado.

S. Ŝtimec



Fotis: Željko Gubijan

FAJREROJ DE LA INSULO HVAR

*Florfolieto
sur aranea fadeno
balanciĝas*

*Briletas roso
la frumatena suno
toleras ĝin.*

Dinko Matković

PRI INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO- KONGRESO KAJ INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO

De la 12-a ĝis la 18 de majo 2007 okazis la 59-a Kongreso de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF) en Parizo. De la 19-a de majo sekvis tritaga postkongreso en Lyon. Laŭ oficialaj informoj en la kongreso estis 268 partoprenantoj el 24 landoj. El Kroatio ĉeestis naŭ personoj, plejparte membroj de Kroata Fervoja Esperanto-Asocio. Dum kongreso (plenkunsido) oni elektis estraron denove el malnovaj membroj de IFEF-prezidantaro: d-ro Romano Bolognesi kiel prezidanto, István Guylás kiel vicprezidanto, Marica Brletić kiel sekretariino, Laurent Vignaud kiel kasistokaj Jean Ripoche kiel redaktoro de oficiala bulteno "Internacia Fervojo". Regula programo de Fake aplika sekcio ampleksis 13 fakajn prelegojn (pri nova linio por rapidaj trajnoj en Francio, eŭropa sistemo de fervojtrafika kaj trajna

regado, historio de fervojaj rapidecoj kaj aliaj temoj). D-ro Zlatko Hinšt prelegis pri oficiala formo de financa statistiko de Internacia Fervoja Unio (UIC) kaj koncernaj dokumentoj en Kroatio de FINA (traduko de formularoj kiaj estas bilanco kaj spezoekonto). Terminara sekcio pritraktis proponitajn fervojajn terminojn. Interesa estis ekspozicio en Parizo pri franca trajno de granda rapideco (TGV) kiu atingis la 3-an de aprilo 2007 mondan rapideco-rekordon (574,8 km/h). Okazis faka ekskurso en Fervoja agentejo pri esplorado en Parizo (de rapidecoj, bremsado, materialoj ktp). Tuttaga ekskurso okazis al kastelo en Versailles kaj al parko kun francaj miniaturoj (de konstruaĵoj) en skalo 1:30. Du duontagaj ekskursoj estis en Parizo. Krom tio okazis bona kulturarta programo (franca folkloro, kantisto)

balo kaj vespera amikumado en bona etoso. En la jaro 2008 IFEF-kongreso okazos en pola urbo Poznań kaj en 2009 en itala Triesto kie oni ekfestos 100-jariĝon de fervojista Esperanto-movado en la mondo.

Zlatko Hinšt

KROATINO MAJA TIŠLJAR EN BRUSELO

Eŭropa Esperanto-Unio ricevis subvenciojn de EU por la projekto **Alieco kiel valoro** pro kiu EEU decidis enoficigi unu junan personon en Bruselo inter oktobro 2007 kaj aprilo 2008. La persono kiu laboros en Bruselo por la projekto estas Maja Tišljár, kroata denaska Esperanto-parolanto, kiu dum la lastaj jaroj loĝas en Germanio.

En Bruselo jam aktivas slovena esperantistino Manca Turk, sed ŝi prizorgas slovenajn interesojn en Bruselo. Bonŝancon al la nova Esperanta brusela oficejo.

S. Ŝ.



Dum la IFEF-kongreso okazis prelego sub titolo "Oficiala formo de financa statistiko de UIC-Internacia Fervoja Unio - Esperanta traduko de formularoj kaj financaj indikiloj". Preleginto kaj tradukinto Zlatko Hinšt preparis kolekton de tradukoj por reta formo. Nun koncerna kontribuado estas atingebla en retadreso de IKEF-Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo www.ikef.info aŭ www.ikef.org sur retpaĝo kun menuo sub eldonoj (klaku lastan parton sub titolo "NOVA: Formularoj de UIC kaj pri financa statistiko". Tiam malfermiĝas kontribuado sub titolo "Oficiala formo de financa statistiko de Internacia Fervoja Unio (UIC) kun traduko de oficialaj formularoj de bilanco kaj spezoekonto en Respubliko Kroatio". Ankaŭ estas atingeblaj

en la sama retpaĝo aliaj kontribuadoj de Zlatko Hinšt - artikoloj (prelegoj el antaŭaj IFEF kongresoj kaj diskutoj) en revuo "La Merkato" (vi povas klaki) - numeroj de LM 86, 87, 89, 92 kaj 93 (aprilo 2007).

Krom akcentitaj detaloj, koncernaj TTT-paĝoj de IKEF enhavas multe da informoj pri menciita organizaĵo (aktualaĵoj, estraro, statuto, membroadministrado, perantoj ktp). Se vi estas ekonomikisto, komercisto, entreprenisto aŭ alia fakulo konektita kun praktika negocado, bonvolu aliĝi en IKEF. Ne forgesu ke kunlaboro kun IKEF estis aprobita en kadro de Laborplano(j) de Kroata Esperanto-Ligo por la jaro(j) 2007 kaj 2008.

Zlatko Hinšt

SEK FESTAS SIAN 50-an NASKIĜTAGON

London la 10-an de decembro 2007 je la 19-a horo, SEK festos sian 50-an jubileon en Europiski dom, Jurišičeva 1. (Tre proksime al sia adreso Amruševa 5, kie SEK vivis de 1957 ĝis 2000). La jubilea festo okazas dum la mandato de la SEK-prezidanto Dag Treer. Bonvenon al ĉiuj iamaj membroj de SEK kaj iliaj amikoj! La festo konsistos el raportoj de kvin prezidantoj de SEK por kvin jardekoj de SEK, muzika ero kaj video-prezento de la grandaj eventoj de SEK tra kvin jardekoj. Tra la programo gvidas Tina Tišljár kaj Dag Treer.

Aparte ekster la festotago en Eŭropa domo, SEK prezentos en Centar za kulturu Peščenica, omaĝe al sia impona jubileo, la ĉefteatraĵon de sia aktuala repertuaro *Galaksia krosŝipo „Ludoviko“ en la epizodo Muro de la mallumo* de Vanja Radovanović. Li aŭtoris la tekston kaj reĝisoris la teatraĵon.

ĈU POST BULGARIO BLINDAJ ESPERANTISTOJ KONGRESOS EN KROATIO?

Kvinmembra delegacio de Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj (Antun Kovač, Branko Repac, Dragan Štoković, Marija Repac kaj Marija Kovač kiel akompanantino), partoprenis la 73-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj en fama bulgara feria loko Albena. Oni diras ke Albena estas paradiza angulo inter arbaro kaj maro. Ĝi situas je 32 kilometroj norde de Varna kaj je 15 kilometroj de la mondkonata ripozloko Zlatni piasci (Ora sablo).

La kongreso okazis de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto kaj kunvenigis 112 partoprenintojn el 12 landoj. Du trionoj de kongrespartoprenintoj estis bulgaroj kaj iliaj najbaroj serboj kaj rumanoj. Manko de okcidentlandaj esperantistoj estis evidenta. Aliaj miaj impresoj estas tre favoraj. Kongresprogramo, je mia plezuro, ne estis tro abunda, tiel ni havis sufiĉan tempon por banado en ondplena Nigra maro, promenado kaj trarigardo de Albena.

Kongrestemo *Esperanto - taŭga rimedo por kultura integriĝo* estis interesa, sed nur kvar prelegoj rekte rilatis al la temo, inter kiuj ankaŭ estis prelego de via raportanto: "Kiel kroata literaturo prezentiĝas al aziaj nacioj per Esperanto". Pli proksimaj al la temo estis kongresaj okazintaĵoj kiel ekz.: kultura programo kun temo: 100 jarojn de Bulgara Esperanto-Asocio kaj Esperanto-movado inter la bulgaraj nevidantoj dum kiu oni ankaŭ proklamis rezultojn de Internacia literatura konkurso; Nacia vespero en kiu prezentiĝis membroj de porblindula kulturcentro el Varna kaj Internacia vespero; recitis ankaŭ Branko Repac el Kroatio.

Por kongresanoj bulgaraj gastigantoj aranĝis du duontagajn interesajn ekskursojn al Balčik kaj Varna.

Kiel kutime du kunsidoj de ĝenerala asembleo de LIBE estis organizita dum kiuj estis pritraktita la

aktuala situacio en LIBE. Mi persone pensas ke ĝi ne estas tiel bona kiel pli frue: nederlandaj blindaj esperantistoj rifuzis organizi la 74-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj kadre la 93-a UK. Kroata delegacio proponis ke kroataj esperantistoj estu gastigantoj de sekvonta kongreso en 2008 en Premantura. Nun, kiam mi skribas ĉi tiun artikolon, bedaŭrinde mi ankoraŭ ne scias ĉu estraro de LIBE konfidus al KUNE organizon de la 74-a IKBE.

Kion diri fine de mia mallonga kongresprezentado el Bulgario? Krom ke ĝi estas paradiza angulo inter arbaro kaj maro, pri Albena oni ankaŭ diras, ke ĝi estas simbolo de la beleco kaj la gastamo de la bulgara virino. La belecon de la bulgara virino mi persone ne sentis, ĉar mia edzino estis kun mi. Koncerne la gastamon, ni ĉiuj dum longa tempo vere havos tre impresajn memorojn pri niaj bulgaraj gastigantoj.

Antun Kovač

MONTKABANA RENKONTIĜO – MKR, GASTIGITA APUD MARO!

MKR jam estas tradicia renkontiĝo por esperantistoj-montmigremuloj kiu dum siaj unuaj 17 jaroj gvidis partoprenantojn tra multaj montoj en Aŭstrio, Kroatio kaj Slovenio, kaj de kelkaj el tiuj montoj videblis maro, sed tamen nur ie en fora malproksimeco. Ĉi-jare estis tute male, la partoprenantoj estis ĉirkaŭitaj per maro, Adriatiko, je ĉiuj flankoj, ĉar la aranĝo okazis sur kroata insulo Cres!

Insulo Cres neniam estas inundita per turistoj: kvankam ĝi estas la plej granda adriatika insulo, ĝi ne havas grandajn hotelojn (entute nur du hoteloj sur pli ol 80 km longa insulo!), sablajn plaĝojn aŭ vaste konatajn kulturajn aŭ historiajn monumentojn ... tamen, ĝi estas tre estimata inter tiel nomataj "ekologiaj turistoj" pro sia foje apenaŭ tuŝita naturo kaj ankoraŭ bone videbla tradicia vivo. Do, ĝuste tion la organizantoj deziris montri ĉi-jare al MKR-partoprenantoj!

La aranĝo okazis en vilaĝo Beli, la loko loĝata jam dum jarmiloj, ekde pre-Romiaj tempoj, sed ĝi nun havas nur 20 konstantajn enloĝantojn, unu pensionon, unu gastejon kaj plej proksima konstanta vendejo troviĝas je 20 km. La menciita pensio estis ĉi-jara MKR-ejo kaj al partoprenantoj, dum jaroj al kutimigitaj al ne ĉiam luksaj montkabanoj, ĝi ofertis agrablan tranoktadon kaj tre bongustan manĝaĵon. Kaj, spite al apenaŭ finiĝinta somero (la aranĝo okazis dum lasta semajnfino en septembro) kaj la vilaĝo kaj la insulo mem

aspektis tute malplenaj kun apenaŭ kelkaj videblaj turistoj. Kaj ne nur plaĝoj (la akvo ne estis tre varma, sed 20 gradoj ja tamen sufiĉis por naĝi ...) estis dezertaj, ankaŭ ĉio alia ...

La aldona novaĵo por MKR-partoprenantoj estis kunlaboro de organizantoj kun du lokaj ekologiaj asocioj. Unua estas asocio *Caput insulae*, kun sidejo en Beli, kiu celas protekti tre maloftan kadavromanĝantan birdon, vulturon, kies lasta habitato en Kroatio troviĝas ĝuste sur insulo Cres. La alia estas asocio *Eko centar Pernat*, kun sidejo en vilaĝo Lubenice, kiu celas revivigi centran parton de insulo Cres kunigante tradiciajn vivmanierojn kun modernaj tempoj. Ambaŭ asocioj zorgas ankaŭ pri kultura heredaĵo de siaj vilaĝoj kaj la ĉirkaŭaĵo kaj emas prezenti ilin al interesitoj.

Kelkaj faktoj pri ĉi-jara MKR-partoprenanto: venis eĉ 43 personoj el 10 landoj. Estas rimarkinde, ke jam dum lastaj 3 jaroj MKR-on partoprenas esperantistoj el dek landoj ... kaj aliaj mirindaj faktoj estas tiuj, ke preskaŭ 20% de partoprenantoj estis infanoj kaj la fakto, ke kvar personoj venis al MKR per biciklo, 3 germanoj kaj 1 nederlandano!

Kaj, kia estis la MKR-programo? Kiel kutime dum MKR, la migradoj estis la ĉefaj programoj, sed ĉi-jare la supre menciitaj asocioj montris al ni almenaŭ parte lokan vivon kaj lokajn tradiciojn. Dum la unua tago (bedaŭrinde, ĉefe pluvoza) la

partoprenantoj vizitis ejon de asocio *Caput insulae* kaj spektis ekspozicion pri vulturoj (inkluzive 3 vivantajn birdoj) kaj pri la norda parto de la insulo Cres ĝenerale. Poste sekvis migrado laŭ interesaj vojoj kiuj gvidis tra forlasitaj vilaĝoj, interesaj labirintoj, nekutimaj flakoj, kaŝtandarbaroj ... tre bele kaj interese, sed pluvego ĝenis ĉiujn dum plej granda parto de la tago.

Venonttage okazis ekskurso al vilaĝo Lubenice, unu el plej konataj vilaĝoj sur insulo Cres, kiu troviĝas 320 metroj super marnivelo, alte super belega plaĝo. Ĉe la alveno membroj de asocio *Eko centar Pernat* gastigis MKR-partoprenantojn per muzikado de loka instrumento "meh" kaj poste ofertis al ĉiuj hejmbakitan panon kun olivoleo. Migrado denove ne mankis - dum unu grupo vizitis najbarajn vilaĝojn Pernat kaj Zbičina, la alia vizitis pinton Helm kun rigardo al najbaraj insuloj Krk, Loŝinj, Susak, Unije kaj la kontinento.

La lasta, adiaŭa tago, komenciĝis kiel kutime, per pakado, ĝisoj kaj kisoj. Tiuj kiuj ne devis haste foriri havis ankoraŭ tempon por plaĝumi (kelkaj ja naĝis, sed aliaj preferis nur sunumi) - la plaĝo estis tute maplena, krom MKR-partoprenantoj neniu alia estis tie. Poste sekvis vizito al urbo Cres, promenado apud haveneto kaj la tagmanĝo ... plejmulto el la restintoj ankoraŭfoje renkontiĝis sur pramŝipo kaj ĝuis varman sunon ... kaj, jes, denove venis la tempo por ĝisi ankoraŭ unu MKR-on. Ĝis la venonta septembro en Slovenio!

Vanja Radovanović

VODNIKOVA 9 – NIA ESTONTA EJO STATO DE FINANCA HELPO EN OKTOBRO 2007:

Ni informas vin, ke cent membroj pagis financon subtenon al Vodnikova inter majo kaj oktobro 2007!

1. Josip Sabljčić	6,87 eŭroj	56. Lucija Rusak	6,87 eŭroj
2. Zlata Nanić	68,68 eŭroj	57. Zlatko Hinšt	27,47 eŭroj
3. Damir Rak	11,81 eŭroj	58. Spomenka Štimec	54,95 eŭroj
4. Janja Kontak	27,47 eŭroj	59. Marta Manojlović	6,87 eŭroj
5. Karmen Crnković-Vranko	27,47 eŭroj	60. Ratimir Metz	13,74 eŭroj
6. Martin Mihaldinec	6,87 eŭroj	61. Milan Rastovac	6,87 eŭroj
7. Berislav Brajan	27,47 eŭroj	62. Dragica Vukadin	10,30 eŭroj
8. Velimir Majdak	15,25 eŭroj	63. Željko Praljak	6,87 eŭroj
9. Ljerka Halajz	4,12 eŭroj	64. Josip Vrančić	27,47 eŭroj
10. Anto Mlinar	19,23 eŭroj	65. Teodor Mikić	27,47 eŭroj
11. Mirjana Žeželj	13,74 eŭroj	66. Krno Tišljar	13,74 eŭroj
12. Marijan Benc	13,74 eŭroj	67. Vera Brigljević	13,74 eŭroj
13. Vlado Jurković	17,44 eŭroj	68. Ivo Osibov	13,74 eŭroj
14. Jelkica Glumičić	13,74 eŭroj	69. Mira Matanović-Manner	41,21 eŭroj
15. Klementina Perašinović	13,74 eŭroj	70. Olga Srkoč	13,74 eŭroj
16. Vukosava Mijić	6,87 eŭroj	71. Ranka Mraković	27,47 eŭroj
17. Branko Korbar	8,24 eŭroj	72. Davor Štimec	27,47 eŭroj
18. Željko Gubijan	27,47 eŭroj	73. Ćiril Stojanov	6,87 eŭroj
19. Đurđa Štokić	41,21 eŭroj	74. Mikaelo Bronstein	2,88 eŭroj
20. Jerko Baković	13,74 eŭroj	75. Zdravka Metz	21,43 eŭroj
21. Marica Radočaj	6,87 eŭroj	76. Blaž Rocek	4,67 eŭroj
22. Slobodan Kukić	5,49 eŭroj	77. Mirko Vidaković	6,87 eŭroj
23. Davor Klobučar	41,21 eŭroj	78. Mira Kocjančić	13,74 eŭroj
24. Nada Radonić	5,49 eŭroj	79. Vukašin Dimitrijević	6,87 eŭroj
25. Dragan Barac	13,74 eŭroj	80. Josip Brkanac	13,74 eŭroj
26. Marija Kvakić	13,74 eŭroj	81. Marija Vukušić	6,87 eŭroj
27. Fjore Saganić	68,68 eŭroj	82. Tom Yuval	3,00 eŭroj
28. Vlado Jurković	14,69 eŭroj	83. Anonima	13,74 eŭroj
29. Sava Matetić-Lučić	16,48 eŭroj	84. Ivan Radulović	15,11 eŭroj
30. Ivo Osibov	13,74 eŭroj	85. Srećko Radulović	15,11 eŭroj
31. Danica Konečni	27,47 eŭroj	86. Milivoj Lozovina	50,00 eŭroj
32. Jadranka Farzsky	6,87 eŭroj	87. Roža Brletić-Višnjić	5,49 eŭroj
33. Ljerka Stilinović	11,26 eŭroj	88. Emilija Obradović	13,74 eŭroj
34. Damir Černić	4,12 eŭroj	89. Nela Dončević	13,74 eŭroj
35. Mato Brčić-Kostić	13,74 eŭroj	90. Jagoda Čaldarević	13,74 eŭroj
36. Mladenka Đaković	13,74 eŭroj	91. Rudolf Hahn	6,87 eŭroj
37. Branka Čečuk	20,60 eŭroj	92. Josip Šlat	13,74 eŭroj
38. Tea Radovanović	10,99 eŭroj	93. Sava Matetić-Lučić	10,03 eŭroj
39. Vjekoslav Morankić	54,94 eŭroj	94. Melanija Žarak	13,74 eŭroj
40. Danijela Bačić-Karković	27,47 eŭroj	95. Đivo Pulitika	13,74 eŭroj
41. Ana Then	20,60 eŭroj	96. Marijan Benc	6,87 eŭroj
42. Ljerka Stilinović	11,26 eŭroj	97. Ruža Tišljar	6,87 eŭroj
43. Ivo Borovečki	6,87 eŭroj	98. Anonima	6,87 eŭroj
44. Dalibor Brozović	13,74 eŭroj	99. Anonima	6,87 eŭroj
45. Anonima	3,43 eŭroj	100. Zlatko Tišljar	13,74 eŭroj
46. Stanko Rukelj	27,47 eŭroj		
47. Tomo Plačković	10,99 eŭroj	De majo 2007 kolektite	1.659,54 eŭrojn
48. Ivo Puharić	27,47 eŭroj	Kolektite ekde la jaro 2003	entute
49. Andela Kanjuo	27,47 eŭroj		15.502,00 eŭrojn
50. Ljiljana Kuzmanović	13,74 eŭroj		<i>Multan dankon al ĉiuj!</i>
51. Drago Smolić	5,00 eŭroj	Nia granda kredito en oktobro 2007	reduktiĝis
52. M. Dimnjaković	20,60 eŭroj	al la ŝuldo de 36.326,86 eŭroj!	
53. Aleksije Herić	13,74 eŭroj		
54. Dušan Adnad	6,87 eŭroj		
			Kompilis: S. Štimec/D. Grgec

ESPERANTO EN LA BIENO GRAJNO DE ZLATA NANIĆ

Zlata Nanić, membro de Esperanto-Societo *Bude Borjan* la 30-an de septembro 2007 okazigis en sia bieno nomata *Zrno* (Grajno) en vilaĝo Habijanovec feston pri la rikolto de la tero. La riĉa programo (simila ripetiĝas jam kvin jarojn) invitis al gustumado de diversaj eko-produktoj, prezentis lecionojn pri fungoj, aŭskultigis la lokan etno- muzikon, ebligis ĉe-fajran dancadon, lecionojn pri ĝardenumado, promenadojn, vilaĝajn kaleŝveturojn... En la proponita menuo troviĝis ĉi-jare ankaŭ Esperanto, kiun prezentis esperantisto el Durdevac, Rijeka, Zagrebo, sub la lerta gvidado de Zlata Nanić mem. Ŝi profitis la okazon por prezenti Esperanton en sia vivo kaj vojaĝojn kiujn Esperanto ebligas. Boris Di Costanzo elluzis la okazon por varbi por la 100-a jubileo de Esperanto en Rijeka okazonta la 17-an de novembro 2007. Membroj de Esperanto-Societo *Bude Borjan* aparte surpriziĝis renkontinte en la bieno – la nevinojn de Bude Borjan mem. Li estis esperantisto pereinta en 1941. Honore al li, la plej malnova zagreba societo postmorte ricevis sian nomon.

S. Štimec

ILEI-KONFERENCO EN RANZAN EN JAPANIO

Post UK en Jokohamo 70 personoj el 23 landoj veturis al Ranzan por ĉeestis la 40-an Internacian Konferencon de Esperanto-Instruistoj. Ankaŭ Kroatio estis en la konferenco prezentita per virinoj, per ses esperantistinoj. La konferencon gastigis Ŝtata edukcentro por virinoj kaj konforme al ĝi la ĉefa temo rilatis al virinoj, respektive al *Virinoj en Esperanto-kulturo*. Al tiu temo estis dediĉita unutaga simpozio kun prelegoj esence instruaj. Spomenka Ŝtimec enkonduke prelegis pri la ĉeftemo. La prelegon teknike helpis bildigi lernanto Drago Ilišinović. Apartan atenton alvokis la prezentoj de Anna Löwenstein kaj YAMAKAWA Setsuko pri Esperanta revuo *Sekso kaj Egaleco* kaj ties japana eldono el la sepdekaj kaj okdekaj jaroj.

Japanoj omaĝis al la japana esperantistino Hasegawa Teru, verkistino kaj ĵurnalistino, kiu subskribis siajn verkojn kiel Verda Majo. Dum UK estis eldonita japanlingva libro pri ŝi. Oni honoris Verdajn Majojn ankaŭ per nomumo de salono honore al ŝi. En Ranzan estis prezentita prelego de Toyohiko Kaba *Kiu volas nomu min perfidulo!* (Verda Majo kaj la japana socio)

Marija Jerković tre valore kontribuis al la temo de konferenco per prelego pri *Esperanto kiel lingvo-ponto inter la kroataj verkistinoj kaj la japanaj legantoj*. Ŝi prezentis la kroatan lingvon kadre de la *Lingva festivalo* kaj reprezentis dum la kunsidoj la novfonditan kroatan sektion de ILEI. La asocio intertempe, la 10-an de septembro 2007, akiris juran personecon, per registriĝo de sia statuto per la kroata nomo Ŭdruga predavaĉa esperanta - UPE. Estu menciite, ke por prezenti la kroatan lingvon Marija Jerković surmetis tradician popolan kostumon el Kroatio kiun por la vojaĝo al Ranzan disponigis Zlata Flego, forpasinta la 15-an de septembro 2007. Tiel Zlata Flego ĝis la lasta vivhoru, helpis sukcesigi Esperantan eventon alikontinente.

Gravas akcenti, ke Ministerio pri scienco, klerigo kaj sporto finance helpis pri la partopreno en Internacia Konferenco de Esperantlingvaj Verkistoj.

Kiam en Japanio oni mencias la nomon Ranzan, ĝi elvokas ideon pri - papilio. Guste la regiono de Ranzan posedas papiliojn tre specifaj. Tial ankaŭ la simbolo de ILEI-konferenco rilatis al ĝi: la tuŝiloj de la papilio formis la vorton ILEI.

Kroataj partoprenintoj havis la okazon ne nur kontribui al la konferenco sed ankaŭ multe profiti el siaj prelegoj kaj ekskursoj ne nur pri Esperanto sed ankaŭ pri la japana kulturo. La fotoj atestas:



Marija Jerković kaj Jagoda Latinović-Caldarević dum la prezento de la kroata lingvo. Sur la alia foto de Zlata Nanić: kroataj partoprenantoj kun kuba kolego lernis praktiki vestadon de japana kimono.



ISIKAWA Tiekio multege laboris por sukcesigi la konferencon en Ranzan kaj ne malpli la aktualaj ĉefmotoroj de ILEI, vicprezidantino Korody Zsafia kun Aida Ĉizikiaite, estraranino.

En 2008 Afriko la unuan fojon gastigon la ILEI-konferencon en la gastiganta lando Benino. Por la jaro 2009 la inviton al la ILEI-konferenco prezentis Slovenio.

S. Ŝtimec

MEMBRO DE ESPERANTO-SOCIETO "BUDE BORJAN" TITOLPAĜE DE GAZETO JUTARNJI LIST

Ni al kutimiĝis, ke sur la titolpaĝo de la gazetoj aperas homoj rilatantaj al krimoj kaj tragedioj. Jen escepto: membro de Esperanto-Societo "Bude Borjan" Renata Žunec aperis sur la titolpaĝo de *Jutarnji list* la 22-an de aŭgusto 2007 kiel membro de la teamo de la zagreba hospitalo *Rebro*. La teamo dum sep tagoj transplantis sep organojn. Renata Žunec, doktoro pri biologiaj sciencoj, profesie laboras en tia respondeca loko. Ankaŭ ŝia edzo Siniša Dvornik membras en "Bude Borjan". Sur la foto: Mirjana Žeželj legas la informon rilatanta al Renata: anstataŭ 20, zagrebaj malsanuloj nun atendas nur du jarojn por ricevi novan renon. (Renata Žunec - la lasta dekstre sur la titolpaĝo.)



Tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvarfoje jare - Jaro XXVI, numero 96 (3/2007), ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de Ministerio de Kulturo de Respubliko Kroatio kaj per helpo de japana leganto s-ro NISIO Tutomu.

Tempo aperas sone sur kompaktdisko ĉe Kroata Unuiĝo de nevidantaj Esperantistoj. Voĉlegas Spomenka Ŝtimec.

Redakcio: Kneza Mislava 11/III, HR-10000 Zagreb, Kroatio, **tel:** (385 1) 4617550, **fakso** (385 1) 4619373, **rete:** esperanto@zg.t-com.hr, www.esperanto.hr - **Kontribuis:** Lucija Borčić, Ivo Borovečki, Roža Brletić-Višnjić, Dobriša Cesarić, Boris Di Costanzo, Siniša Dvornik, Kaja Farzsky, Danira Grgec, Željko Gubijan, Marija Jerković, KIKUSHIMA Kazuko, Zlatko Hinšt, IZUMI Yukio, Antun Kovač, Nacionalna zaklada za razvoj civilnog društva, Davor Klobučar, Tena Kuzmanović, Dinko Matković, Radenko Milošević, Vjekoslav Morankić, Zlata Nanić, Velimir Piškorec, Vanja Radovanović, Spomenka Ŝtimec, TANIKAWA Shuntarō, Zlatko Tišljar, Dag Treer, Božidar Vančik, Domagoj Vidović. **Redaktis:** Spomenka Ŝtimec, **Grafike aranĝis:** Josip Pleadin. **Presis:** Grafokom, Đurdevac, grafokom@kc.htnet.hr

Anonctarifo 1/1 paĝo 1000 kn (135 EUR) 1/2 paĝo 500 kn (68 EUR), lasta kovrilpaĝo 2.500 kn (328 EUR). **Abono:** 4 numeroj jare 40 kn (9,5 EUR), unuopa numero 10 kn (1,5 EUR)



100 jaroj de Esperanto en Kroatio 100 jaroj de Esperanto en Rijeka

Rijeka, la 17-an de novembro 2007

- 8h00 Ekiro de senpaga aŭtobuso el Zagrebo al Rijeka de Autobusni kolodvor – Turistički peroni 501-504
(Necesas aliĝi kaj rezervi sidlokon en la buso. Aliĝkotizo por la festo estas 50,00 kn ĉe KEL, Tel. 091 4617550)
- 10h00 Partoprenantoj kolektiĝas ĉe la urboparto Delta (aŭtoparkejo)
- 10h15 Malfermo de Esperanto-Strato en Rijeka (konfirmota)
- 11h00 Trarigardo de la urbo
- 14h00 Libera tempo
- 15h30 Starigo de memortabulo sur la unuan sidejon de Esperanto-Societo en Rijeka, Korzo 18 (konfirmota)
- 16h00 Filatelia stampo kaj koverto okaze de la centa jubileo
- 16h30 Ekspozicio de Esperantaj libroj
- 18h00 Solena festo en Kroata Kulturdomo

La 100-a jubileo de Esperanto en Kroata Kulturdomo

Programo

- Bonveniga saluto (Vida Jerman, anoncantino de la programo)
- Kroata himno – Virina koruso Učka – Matulji
- Salutparoladoj de gastoj kaj ĉeestantoj
- Cent jaroj de Esperanto en Rijeka kaj en Kroatio – referaĵo de la prezidanto Boris Di Costanzo
- Virina koruso kantas en Esperanto
- Georgo Handzlik (Pollando) koncertas kun gitaro (konfirmota)
- Vida Jerman (el ŝia teatra repertuaro)
- Neven Mrzlečki (el lia muzika repertuaro)
- Konkluda parolado de la prezidanto de la Societo el Rijeka
- Esperanta himno *La Espero* – Virina koruso
- Koktelo

**Aŭspiciantoj: Departamento Primorsko-goranska
Urbo Rijeka**

Fino je la 21h00
Aŭtobuso reiras al Zagrebo. Reveno al Zagrebo ĉ. 23h00

Organizanto: Esperanto-Societo Rijeka,
Blaža Polića 2
HR 51000 Rijeka
Hrvatska/ Kroatio

esperanto.rijeka@ri.t-com.hr
Tel/fakso 051 228 -148
Prezidanto Boris Di Costanzo: 098-9294623

